# TEJO-aktuale: numero 219, 2009-06-28

## TEJO serĉas volontulon!

- TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 10-18 monatoj (pli aŭ malpli longa daŭro esceptokaze ankaŭ eblas, ni preferas almenaŭ tutan jaron) ekde tiam, kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Paŭlo Ebermann finiĝos, do ekde septembro 2009 (preciza dato laŭ interkonsento). La limdato por kandidatiĝi estas ĵaŭdo, la 16a de julio 2009 (alventempo de retmesaĝo aŭ paper-letero, ne sendodato). Ni bonvenigas ĉiujn kandidatojn prezenti sin dum IJK (18a ĝis 25a de Julio, Liberec, Ĉeĥio). Tamen, ĉeesto dum la IJK ne estas kondiĉo. Legu pli: http://www.tejo.org/eo/volontulu

## KEF 9 en 2009, la 7a ĝis la 12a de julio 2009, Helsingør, Danio

- Jes, KEF okazos en 2009, ĉi-foje revenanta al Danio kaj la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør. La datoj estas la la 7a ĝis la 12a de julio 2009. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/774

## Kontribuu al programo de IJK en Liberec'!

- Saluton!

Mi nur memorigas ke ni daŭre serĉas kontribuojn por la programo de IJK en Liberec'. Tio rilatas ĉefe al la tema programo, tamen aliaj kontribuoj ankaŭ bonvenas. Temo de la IJK estas Liberec' (samkiel la ĉeĥa urbo, kie IJK okazos). Se vi volus iel kontribui al la tema programo, sed ne ĝis fino scias kiel, vi povas inspiriĝi dank' al ĉi-suba listo de aspektoj de libereco:
- religia/spirita libereco (iom mankas al ni kontribuoj de eksterkristianismaj religioj aŭ filozofiaj sistemoj)
- ekonomia libereco (kaj ekzemple ĝiaj aspektoj dum financa krizo)
- politika libereco (demokratio, anarkio ktp.)
- persona libereco
- libereco de grupiĝo
- libereco de edukado
- libereco de amaskomunikiloj
- libereco de pensado
- libereco de parolado
- seksa libereco

Kontribuproponojn bonvolu enskribi dum aliĝado ĉe http://tejo.org/ijk (se vi ankoraŭ nealiĝis) aŭ sendi al ijk.programo@esperanto.cz
Amike, LukiZ

## Venu al someraj kursoj en franca kastelo Greziljono

- Ni bezonas Greziljonon kaj Greziljono atendas pli da lernantoj. Venu kaj venigu en julio kaj aŭgusto 2009 Venu por lerni, ripozi, ekskursi, babili, promeni, ĝui la someron.

Vidu ĉiujn informojn en tiu dokumento printebla: http://gresillon.org/eventoj/programo_staghoj_2009.doc
ĉefa pagho: http://www.gresillon.org/?lang=eo
programo: http://gresillon.org/spip.php?rubrique8&lang=eo
tarifo: http://gresillon.org/spip.php?rubrique8&lang=eo
kore salutas kaj invitas vin la teamo el Greziljono
respondu nur al bert.schumann ĉe gmail.com

## KEKSO - 25a ĝis 27a de septembro 2009

- La 8a Kekso-renkontiĝo okazos la 25an ĝis 27an de septembro 2009 en Dessau, Germanio.

Ĝi estas malgranda renkontiĝo de la Germana Esperanto-Junularo por junuloj inter 15 kaj 25 jaroj, enhavas Esperanto-kursojn, aliajn amuzaĵojn kaj multajn keksojn. Oni aparte bonvenigas ne-germanojn (por pli paroligi la novulojn en Esperanto). Legu pli: http://tejo.org/eo/node/915

## Somera Esperanto-Kurskunveno de KEJ

- ... okazos de 21a ĝis 23a de aŭgusto 2009 en Wonju, Korea Respubliko. Jen la detaloj, kiujn sendis al mi nia korea komitatano. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/911

### Ankoraŭ liberaj lokoj por la laborfesto de DEJO en Roskilde (2009-06-28 ĝis 2009-07-06)

- Dana Esperantista Junulara Organizo, nia landa sekcio en Danio, ĉiujare okazigas dum la grandega Roskilde-Festivalo laborfeston por Esperantistoj el la tuta mondo. Legu pli: http://www.tejo.org/eo/node/916

### 44a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 29a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (12a-17a de julio 2009, Juiz de Foira, Brazilo)

- Speciale interesa estos por junuloj la ĉeftemo de la 44a Brazila Kongreso de Esperanto kaj la 29a Brazila Esperantista Junulara Kongreso: "Esperanto kaj Junularo: Bazoj por la estonteco". Legu pli: http://tejo.org/eo/node/833

### Dua Nacia Kongreso de Esperanto en Burundio (10-a ĝis 16-a de julio de 2009 en Rumonge)

- La plivivligata Nacia Asocio de Esperanto en Burundi invitas vin subteni la lokajn esperantistojn per partopreno en la Dua Nacia Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Rumonge. Multaj neniam antaŭe partoprenis internacian renkontiĝon, do via partopreno certe signifos multon por ili. Estas jam eŭropanoj kaj amerikanoj, kiuj konfirmis partoprenon! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/831

### Venontaj renkontiĝoj

- Aliĝu al la IJK en Liberec'! 18.7.2009 – 25.7.2009, Ĉeĥio http://www.tejo.org/ijk/;

94a Universala Kongreso de Esperanto, 25a Julio ĝis 1a de Aŭgusto 2009, Białystok, Pollando http://tejo.org/eo/node/787;

ILEI konferenco okazos la 17-25an de julio 2009 en Krakovo, Pollando http://www.ilei.info/agado/Krakovo.php;

44a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 29a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (12a-17a de julio 2009, Juiz de Foira, Brazilo) http://tejo.org/eo/node/833;

2-a Kongreso de Serbiaj Esperantistoj (26a-28a de junio 2009, Jagodina) http://tejo.org/eo/node/834;

Aŭgusto 2009 - Itala Kongreso en Cassino http://tejo.org/eo/node/819;

Dua Nacia Kongreso de Esperanto en Burundio (10-a ĝis 16-a de julio de 2009 en Rumonge) http://tejo.org/eo/node/831;

Somera Esperanto-Studado (SES-2009) okazos inter la 10-a kaj la 18-a de julio 2009. http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php;

Somera Esperanto-Kurskunveno de KEJ http://www.tejo.org/eo/node/911;

8. Kekso Esperanto-renkontiĝo (25.09. - 27.09.09) en Dessau, Germanio http://www.tejo.org/eo/node/915;

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu

### TEJO serĉas volontulon!

- TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 10-18 monatoj (pli aŭ malpli longa daŭro esceptokaze ankaŭ eblas, ni preferas almenaŭ tutan jaron) ekde tiam, kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Paŭlo Ebermann finiĝos, do ekde septembro 2009 (preciza dato laŭ interkonsento). La limdato por kandidatiĝi estas ĵaŭdo, la 16a de julio 2009 (alventempo de retmesaĝo aŭ paper-letero, ne sendodato). Ni bonvenigas ĉiujn kandidatojn prezenti sin dum IJK (18a ĝis 25a de Julio, Liberec, Ĉeĥio). Tamen, ĉeesto dum la IJK ne estas kondiĉo. Legu pli: http://www.tejo.org/eo/volontulu

### KEF 9 en 2009, la 7a ĝis la 12a de julio 2009, Helsingør, Danio

- Jes, KEF okazos en 2009, ĉi-foje revenanta al Danio kaj la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør. La datoj estas la la 7a ĝis la 12a de julio 2009. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/774

### Kontribuu al programo de IJK en Liberec'!

- Saluton!

Mi nur memorigas ke ni daŭre serĉas kontribuojn por la programo de IJK en Liberec'. Tio rilatas ĉefe al la tema programo, tamen aliaj kontribuoj ankaŭ bonvenas. Temo de la IJK estas Liberec' (samkiel la ĉeĥa urbo, kie IJK okazos). Se vi volus iel kontribui al la tema programo, sed ne ĝis fino scias kiel, vi povas inspiriĝi dank' al ĉi-suba listo de aspektoj de libereco:
- religia/spirita libereco (iom mankas al ni kontribuoj de eksterkristianismaj religioj aŭ filozofiaj sistemoj)
- ekonomia libereco (kaj ekzemple ĝiaj aspektoj dum financa krizo)
- politika libereco (demokratio, anarkio ktp.)
- persona libereco
- libereco de grupiĝo
- libereco de edukado
- libereco de amaskomunikiloj
- libereco de pensado
- libereco de parolado
- seksa libereco

Kontribuproponojn bonvolu enskribi dum aliĝado ĉe http://tejo.org/ijk (se vi ankoraŭ nealiĝis) aŭ sendi al ijk.programo@esperanto.cz
Amike, LukiZ

### Venu al someraj kursoj en franca kastelo Greziljono

- Ni bezonas Greziljonon kaj Greziljono atendas pli da lernantoj. Venu kaj venigu en julio kaj aŭgusto 2009 Venu por lerni, ripozi, ekskursi, babili, promeni, ĝui la someron.

Vidu ĉiujn informojn en tiu dokumento printebla: http://gresillon.org/eventoj/programo_staghoj_2009.doc
ĉefa pagho: http://www.gresillon.org/?lang=eo
programo: http://gresillon.org/spip.php?rubrique8&lang=eo
tarifo: http://gresillon.org/spip.php?rubrique8&lang=eo
kore salutas kaj invitas vin la teamo el Greziljono
respondu nur al bert.schumann ĉe gmail.com

### KEKSO - 25a ĝis 27a de septembro 2009

- La 8a Kekso-renkontiĝo okazos la 25an ĝis 27an de septembro 2009 en Dessau, Germanio.

Ĝi estas malgranda renkontiĝo de la Germana Esperanto-Junularo por junuloj inter 15 kaj 25 jaroj, enhavas Esperanto-kursojn, aliajn amuzaĵojn kaj multajn keksojn. Oni aparte bonvenigas ne-germanojn (por pli paroligi la novulojn en Esperanto). Legu pli: http://tejo.org/eo/node/915

### Somera Esperanto-Kurskunveno de KEJ

- ... okazos de 21a ĝis 23a de aŭgusto 2009 en Wonju, Korea Respubliko. Jen la detaloj, kiujn sendis al mi nia korea komitatano. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/911

### Ankoraŭ liberaj lokoj por la laborfesto de DEJO en Roskilde (2009-06-28 ĝis 2009-07-06)

- Dana Esperantista Junulara Organizo, nia landa sekcio en Danio, ĉiujare okazigas dum la grandega Roskilde-Festivalo laborfeston por Esperantistoj el la tuta mondo. Legu pli: http://www.tejo.org/eo/node/916

### 44a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 29a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (12a-17a de julio 2009, Juiz de Foira, Brazilo)

- Speciale interesa estos por junuloj la ĉeftemo de la 44a Brazila Kongreso de Esperanto kaj la 29a Brazila Esperantista Junulara Kongreso: "Esperanto kaj Junularo: Bazoj por la estonteco". Legu pli: http://tejo.org/eo/node/833

### Dua Nacia Kongreso de Esperanto en Burundio (10-a ĝis 16-a de julio de 2009 en Rumonge)

- La plivivligata Nacia Asocio de Esperanto en Burundi invitas vin subteni la lokajn esperantistojn per partopreno en la Dua Nacia Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Rumonge. Multaj neniam antaŭe partoprenis internacian renkontiĝon, do via partopreno certe signifos multon por ili. Estas jam eŭropanoj kaj amerikanoj, kiuj konfirmis partoprenon! Legu pli: http://tejo.org/eo/node/831

### Venontaj renkontiĝoj

- Aliĝu al la IJK en Liberec'! 18.7.2009 – 25.7.2009, Ĉeĥio http://www.tejo.org/ijk/;

94a Universala Kongreso de Esperanto, 25a Julio ĝis 1a de Aŭgusto 2009, Białystok, Pollando http://tejo.org/eo/node/787;

ILEI konferenco okazos la 17-25an de julio 2009 en Krakovo, Pollando http://www.ilei.info/agado/Krakovo.php;

44a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 29a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (12a-17a de julio 2009, Juiz de Foira, Brazilo) http://tejo.org/eo/node/833;

2-a Kongreso de Serbiaj Esperantistoj (26a-28a de junio 2009, Jagodina) http://tejo.org/eo/node/834;

Aŭgusto 2009 - Itala Kongreso en Cassino http://tejo.org/eo/node/819;

Dua Nacia Kongreso de Esperanto en Burundio (10-a ĝis 16-a de julio de 2009 en Rumonge) http://tejo.org/eo/node/831;

Somera Esperanto-Studado (SES-2009) okazos inter la 10-a kaj la 18-a de julio 2009. http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php;

Somera Esperanto-Kurskunveno de KEJ http://www.tejo.org/eo/node/911;

8. Kekso Esperanto-renkontiĝo (25.09. - 27.09.09) en Dessau, Germanio http://www.tejo.org/eo/node/915;

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu